

# Brazilei

jaro 1 n-ro 4 2007



## Valoro de Rakontado kaj aŭskultado

Paulo Sergio Viana



Lude kaj lerne  
per butonoj

Parolo de  
spertulo:  
Prof. Sylla Chaves





## Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Faka asocio pri instruado havanta operaciajn rilatojn kun Unesko kaj aliginta al Universala Esperanto-Asocio (UEA)  
[www.ilei.info](http://www.ilei.info)



Brazila Sekcio de ILEI

**Provizora Sekciestro:** Joseo Tenorjo  
**Sekretariino:** Conceição Rodrigues  
**Kasisto:** Joel Afonso Francisco  
**Komitatano:** Marcos Zlotovich

Brazila Sekcio de ILEI funkcias ĉefe per interreto ĉe la adreso

**[www.ileibr.org](http://www.ileibr.org)**  
[geinstruistoj@ileibr.org](mailto:geinstruistoj@ileibr.org)  
[biblioteko@ileibr.org](mailto:biblioteko@ileibr.org)  
[butiko@ileibr.org](mailto:butiko@ileibr.org)

### Poŝtadreso por korespondado

Rua Francisco Garcia, 168 - Itaquera  
08230-560 São Paulo, SP - Brazilo  
Telefono: (11) 6155-7978

## Brazilei

aperas kvarfoje jare kaj estas eldonata de Brazila Sekcio de ILEI

**ĉefredaktanto:** Joseo Tenorjo  
**kontakto:** [revuo@ileibr.org](mailto:revuo@ileibr.org)  
**grafikaranĝo:** Joseo Tenorjo  
**kontrollegantoj:** José Dias Pinto,  
Eurico A. Ribeiro, Conceição Rodrigues kaj Edson Ponciano.

**kunlaboris en tiu ĉi numero:** Prof. Sylla Chaves, Paulo Sergio Viana, Maria Nazaré de Carvalho Laroca, Ulysses Baldez, Osmar da Silva Alves, Conceição Rodrigues kaj Fabiano Henrique.



## LETEROJ

Koran dankon por la tria numero de Brazilei (...). Ĝi estas revuo bela kaj altnivela kun interesa enhavo. Mi vere gratulegas al teamo de ILEI-br!

*Jozefo Pacheco, Portalegro/RS*

### Kiel artikole kontribui por Brazilei:

- Raporto pri instruagado en via regiono aŭ kursejo, se eble kun fotoj;
- Verkado aŭ traduko/adapto de mallonga instruamuzo teksto;
- Desegno aŭ traduko (kun permeso de la aŭtoro) de bildstrioj;
- Verkado de eseeto pri temoj koncernantaj al instruado;
- Recenzo de esperanta leg- aŭ lernolibro.
- Kompilado de tekstoj por la rubriko "Kurzioza Mondo";
- Lecionospicimeno: ĉiu instruisto havas apartan manieron gvidi lecionon. Raporto pri kiel oni uzas sian instruilaron estas ege bona.
- Kian neforgeseblan lecionon vi jam gvidis? Uzu la rubrikon "Enklasaj Travivaĵoj" por kunĝui ĝin kun aliaj kursgvidantoj.
- Esperanta proverbaro estas riĉega esprifonto ne multe uzata de esperantistoj. Eltrovi praktikan uzadon por tiu ĉi trezoro estas nia invito!
- Instruado de fremda lingvo por infanoj estas tute aparta mondo. Se vi iom spertas pri tiu fako, via artikolo estas sopire atendata!
- Se neniu el la ĉisupraj sugestoj plaĉas al vi, proponu mem vian temon.

*Kontribuojn sendu rete al <[revuo@ileibr.org](mailto:revuo@ileibr.org)> aŭ poŝte al la adreso de la Sekcio (vidu en la kolofono ĉi-apude).*



# Enhavo

**Karaj Geinstruistoj**  
Raportu pri via laboro! 04

**Parolo de spertulo**  
Prof. Sylla Chaves 06

**La Sekcio Interne**  
Budo alloga 14

**Elvira Fontes**  
Omaĝo al nia elstara pedagogino 22

Artifikoj por eviti konsulton al vortaro 16

Pri la valoro rakonti kaj aŭskulti rakontojn 24

Unua libro en Esperanto 70-jariĝas 30

Pri la uzado de verbaj aspektoj en Esperanto 32

Neforgesebla skoldo 35

Ni trovis en la reto 28

Notinde 29

Poemo 34

Kurioza mondo 36

Lude kaj lerne 38

Taksu viajn konojn 39

Aviztabulo 40

Kiel diri 42

## Raportu pri via laboro!

Plia numero de la revuo atingas vin. Ĝia aperritmo ankoraŭ ne estas regula, malgraŭ niaj klopodoj. Multe helpus al la reguleco de ĝia aperritmo, se pli da homoj reagas al nia invito artikoli por la revuo. Ni komprenas la motivojn kiuj forrabas de nia laboro redakta tiujn spertajn edukistojn. Pro tiu ĉi nereguleco, ni decidis ne plu klasifi la revuon kiel trimonatan. De nun ni simple diru, ke ĝi aperas kvar fojojn jare. Tio parte havigos al ni iom da libereco por plibonigi la enhavon de la revuo. Perdo unuflanke, gajno aliflanke.

Profitu el la spertoj de nia plurfaka edukisto, Prof. Sylla Chaves, kiu regalas la legantojn per 8-paĝa intervjuo (p. 6). Ĝuu resumajn raportojn pri la ĉijara okazinta Brazila Kongreso de Esperanto kaj la allogaĵoj de nia tiea budo (p. 14). Ĉu vi kutimas plendi, ke viaj gelernantoj ne emas al legado? Legu kelkajn sugestojn (p. 16) pri kiel helpi ilin eviti oftajn konsultojn al vortaro dum legado.

Nia plej elstara pedagogino, Elvira Fontes, forlasis nin. Luj diras, ke ŝi ĉieleniris kaj, ĉar ŝi multe laboris por Esperanto surtere, porĉiame ripozos sur nubfotelo aŭskultante la esperantan himnon. Aliaj garantias, ke tia transtomba neniofarado estas ja vera infero, kaj tial ŝi certe petos por tuj reveni surteren cele plenumi tiujn iniciatojn kiujn, pro manko de tempo, ŝi ne komencis. Post legado de nia omaĝo al ŝi (p. 22), kian ĉielon vi bildigas por tiaj laboremaj homoj?

# Geinstruistoj



Agrablajn rememorojn pri sia infanaĝo portas tiuj homoj, kies gepatroj kutimis legi mirrakontojn ĉe enlitiĝo. Legu sur p. 24 iom pri la bonefikaj rezultoj de tiu interhoma sperto pli kaj pli neglektata de modernaj urbanoj. Ĉinumere ni memorigas pri du retaj servoj (p. 28), kiuj certe iel havigos al vi bonajn ideojn por pliriĉigi viajn lecionojn. Kunfestu la aperigon de la unua libro originale verkita en Esperanto, nialande, per legado de la celebros-artikolo (p. 30) sendita de Fabiano Henrique, el la urbo Rio.

Kiel aspektas via skribado? Se vi emas senkompatate flankenlasi la sufikson "ad" el viaj skribaĵoj, legu la artikolon pri verba aspekto (p. 32) kaj ree pripensu vian decidon. Kian krevmaizon vi kutimas frandi dum spektado de filmo aŭ televidprogramo? Certe ne tian preparitan de la majaa popolo antaŭ pli ol mil jaroj. Scivolo tiklas vin? Saltu rekte sur p. 36!

Butonoj: ili helpas protekti niajn korpopartojn de veteraj ŝanĝiĝoj kaj tenas la publikan scivolon for de tiuj plej intimaj partoj. Malgraŭ tio, ni atentis pri ili, nur kiam mankas unu sur nia vesto... Praktikemaj homoj eĉ opinias ilin senvaloraj kaj anstataŭigas ilin per fulmfermilo (zipo). Legu artikoleon sur p. 38 pri ilia pedagogia valoro kaj rapide protekti ilin de kompleta malaperigo!

Laste, taksu viajn konojn per peco-tradukado el brazila klasikaĵo (p. 39) kaj sendu vian tekston al nia redaktejo. Plej bona traduko-solvo gajnos libro-premion kaj estos publikigita, kun komentoj, en la sekva n-ro de Brazilei.

Agrablan legadon kaj ĝis baldaŭ!

Pro sia uzado de Esperanto por monda paco kaj homara feliĉo Prof. Sylla Chaves estas laŭreato de la premio Onisaburo Deguĉi (1991), unu el la plej gravaj premioj en la Esperanto-movado. Sed premion pro lia pionira didaktika verkaro oni ne aljuĝis al li, ĉar tia premio ankoraŭ ne ekzistas. Estas netaksebla lia kontribuo por la disvolviĝo de plurmediaj lerniloj kaj instruhelpiloj celantaj ĉefe komentajn kaj progresintajn uzantojn de la lingvo.

Intervjuoj pri lia diversaspekta agado por Esperanto jam aperis en pluraj periodaĵoj. Tiu ĉi intervjuo resumiĝas preskaŭ nur al malpli esplorita faceto de nia intervjuito: la vortaristo pledanta por la restaŭro de la perdita simpleco de la lingvo. La temo-limigo estis por ni ege dolora, ĉar ĝuste ĉijare li kompilis, kunhelpe de Neide Barros Rêgo, du ampleksajn verkojn: "Brazila Esperanta Parnaso", esperantan antologion kun 307 poemoj de 178 brazilaj poetoj, kaj "Poesias Escolhidas", dulingvan antologion kun ĉirkaŭ 150 poemoj prenitaj el la Brazila Esperanta Parnaso. Anstataŭ aldoni demandojn al nia temo pri tiuj ĉi verkoj "engaĝitaj en la batalo por pli bona mondo", kiel li mem difinas sian plej freŝan laboron, ni invitas vin akiri la menciitajn verkojn ([www.ileibr.org/butiko](http://www.ileibr.org/butiko)) kaj mem ĝui ilin.

Per la temo-limigo de nia demandaro ni celas ankaŭ voki la atenton de esperantistoj al la grava kompilado de praktika esperanta-esperanta vortaro entreprenita de nia intervjuito. Nun konu iom pli pri la vortaristo kaj lia multjara laboro.

# spertulo

## Prof. Sylla Chaves

Prof. Sylla Chaves naskiĝis en Santana do Livramento/RS en 1929, studis juron (Rio), kibernetikan pedagogion (Germanio), politikan sciencon (Parizo) kaj magistriĝis pri komunikado en Stanford (Usono). Dum pluraj jaroj li ankaŭ laboris ĉe la Sekretariejoj de UN (Novjorko) kaj Unesko (Parizo). Plurfoje premiita en beletraj konkursoj, liaj verkoj daŭre aperas en diversaj antologioj. Krom honora membro de UEA (1992), li estis membro de la Akademio de Esperanto (1986-1995).

Li prezidis Brazilan Esperanto-Ligon (1978-1982), ellaboris kursojn per korespondado, per radio kaj per televido. Lia vasta kaj pionira esperanta verkaro konsistas el abundo da facilaj legaĵoj, diskoj, sonbendoj, vidbendoj, DVD-oj kaj lernolibroj.



Foto: Eni Alves de Oliveira

**Brazilei:** Nuntempe vi preparas adapton de via furora bildvortaro al la portugala, kaj planas la samon por pliaj lingvoj. Al kio vi atribuas la sukceson de tiu ĉi verko?



**Sylla Chaves:** Mi samtempe antaŭenigas diversajn projektojn. La traduko de mia ORIGINALA ESPERANTA BILDVORTARO estas unu el ili. Ĝia aperigo en pluraj lingvoj taŭgos por komparo kaj esploro. Mi ektradukis ĝin portugalen, kaj instruisto de la hispana, hispanen. Aliaj tradukoj sekvas ilin. Sed mi haltigis mian tradukon pro pli urĝaj prioritatoj. Dum tiu paŭzo, mi helpis la Akademion de Esperanto en la esploroj por oficialigo de urĝe bezonataj vortoj, antaŭenigis mian delonge promesitan PRAV, kaj pretigis, kun poetino Neide, antologion nomatan Brazila Esperanta Parnaso. OEB estas delonge preta, kaj ankoraŭ bone disvendiĝas en Brazilo kaj eksterlande. Mi atribuas ĝian sukceson al la bona laboro de la desegnisto, kaj al la fakto, ke ĝi ne estas traduko el etnolingva vortaro. Ĝi adaptiĝas al la bezonoj de esperantistoj kaj al la tutmondeco de Esperanto. Ĝia iama traduko al etnaj lingvoj aldonos prestiĝon por Esperanto, kiel lingvo por la tutmondo, kaj helpos la komparon de gravaj Esperantaj vortoj kun aliaj lingvoj. Ĝi estas je la dispono de interesataj tradukontoj.

**Brazilei:** Krom tradukisto kaj verkisto, vi estas ankaŭ poeto. Ĉu la vortaristo aldoniĝis pro neceso?

**Sylla Chaves:** Certe jes. Verkistoj bezonas legantojn. De verkado mi paŝis al instruado kaj ellaboro de plurspecaj lerniloj. De tie al facilaj legaĵoj por novuloj kaj nobakitoj. Mi fariĝis vortaristo pro neceso. Esperanto havas sufiĉe da poetoj, verkistoj kaj tradukistoj. Eĉ da instruistoj kaj aŭtoroj de lerniloj. Sed malmultaj akceptas la pezan taskon pretigi vortaron. Krome, la ekzistantaj vortaroj ne plene kontentigas min. Mi volas kombini la bonajn kvalitojn de la vortaroj, kiujn mi uzis en la lernado de diversaj lingvoj. Resume, mi volas ellabori la vortaron, kiun mi ŝatus trovi kiam mi eklernis Esperanton. La tasko estas peza, sed mi sentis la bezonon entrepreni ĝin.



**Brazilei:** Kiu aspekto de la lingvo plej plaĉas al vi kiel verkisto, tradukisto, poeto kaj vortaristo?

**Sylla Chaves:** La kombino de ĝiaj izola kaj aglutina karakterizo kun latinida ŝajno. Ĝiaj vortelementoj uzeblas memstare kaj nevarie, kiel en pluraj aziaj kaj indiĝenaj lingvoj. Tamen, al niaj oreloj Esperanto sonas familiare, latinide. Tio permesas akceli ĝian lernadon kaj postan memorigon, kaj donas al ĝi samtempe riĉon kaj facilon. Mi nur bedaŭras, ke E-instruistoj prokrastas la prezenton de tiu duobla aspekto. Kelkaj substrekas nur ĝian facilon, aliaj nur ĝian riĉon. Tial tro multaj eklernantoj forlasas siajn kursojn, konsiderante ĝin malfacila. Aliaj daŭrigas ilin, kaj eĉ ekinstruas, sed restas balbutuloj aŭ inventistoj de nenecesaj vortoj (novaj radikoj aŭ komplikaj kunmetoj), kiuj teorie povus esti Esperantaj, sed ne estas. Esperanto fariĝis vivanta lingvo, kaj ne plu estas ludilo por flavbekulo.

**Brazilei:** Ĉar ekzistas nek perfekta, nek kompleta vortaro, kian vortaron vi konsideras konsultinda?

**Sylla Chaves:** Por mi mem, ĉiajn, eĉ la pli malbonajn: unulingvajn, dulingvajn (en unu aŭ en du direktoj) kaj plurlingvajn. Ĉiuj povas alporti ion al miaj esploroj. Kelkajn mi konsideras ne nur konsultindaj, sed ankaŭ legindaj, studindaj, kiel lernolibro. Mi tamen konsideras kelkajn vortarojn malutilaj por komencantoj, ĉar malklaraj aŭ eĉ konfuzigaj. La malnovaj vortaroj estis pli bonaj ol la novaj. PV estas pli bona ol PIV. Sed la Nova PIV estas pli bona ol la malnova, ĉar ĝi reprenis la vojon al simpleco.



**Brazilei:** De pli ol dek jaroj vi kompilas materialon por eldonado de pli aŭdaca projekto, nome la unudirekta Praktika Vortaro de Esperanto (PRAV), kiu jam parte elŝuteblas en la interreto. En kio konsistas la praktikebleco de via nova vortaro?

**Sylla Chaves:** En mia opinio, en diversaj kvalitoj, kiel la jenaj: forigo de la teknikaĵoj, kiuj pezigas PIV (kiu tamen meritas konsultojn de teknikistoj, aldone al fakaj vortaroj); abundo de bildoj

(prenitaj el OEB); indiko, ĉu la vorto estas fundamenta, oficialigita, ne oficiala sed zamenhofa aŭ ne oficiala nek zamenhofa; indiko de vortofteco laŭ esploro per Guglo kaj aliaj fontoj; enmeto ankaŭ de tre uzataj propraj nomoj kaj mallongigoj; aperigo de derivaĵoj en sia alfabeto ordo; ofta atentigo pri homonimoj, sinonimoj kaj antonimoj kaj pri plursignifaj vortoj. Laŭ mi, tio faciligas la elekton fare de la konsultanto de la vortaro.

**Brazilei:** Oni ĉiam supozas, ke vortarista laboro postulas grupon de kunlaborantoj. En la enkonduko de PRAV vi tamen skribas, ke vi preferas labori sola cele al rapidigo. Kiu estas esence la malavantaĝo de grupa laboro?

**Sylla Chaves:** Mi skribis, ke mi intencas fari sole la finredakton de tiu vortaro, sed profiti, kiel eble plej multe, la laboron faritan de aliaj. Mi konsultas spertulojn, petas opiniojn kaj serioze konsideras ilin. Sed mi opinias, ke disdivido de respondeco, aŭ serĉo de ĉies aprobo, malrapidigas iun ajn laboron, aŭ produktas malkoheran tutajon. Se grupa laboro kun formala voĉdono estus la plej bona solvo, la Akademio de Esperanto jam estus pretiginta bonegan vortaron, kaj neniu privatulo bezonus individue okupiĝi pri vortaroj. Mi ne kontraŭas la iaman aperigon de vortaro de la Akademio aŭ la daŭran evoluon de la malpli kolektiva PIV, sed mi opinias, ke bonintenca individuo devas klopodi rapide kaj serioze prezenti sian laboron, ne forgesante konsulti la laboron jam faritan de aliaj. Eble tio eĉ helpas la iaman faradon de la Vortaro de la Akademio.

**Brazilei:** Kiu estas la graveco de vortaristo por arta lingvo kiel Esperanto?

**Sylla Chaves:** Multe pli granda ol tiu de la vortaristoj por etnaj lingvoj. Etnaj lingvoj estas ĉies kreaĵo. Etnalingvaj plenkreskuloj kontribuas al ilia evoluo, dum infanoj kaj eksterlandanoj lernas ilin. Bonaj verkistoj, instruistoj kaj amaskomunikistoj atentigas pri la konstanta evoluo de sia etna lingvo (el interne kaj el ekstere), kaj klopodas ĉiam adaptiĝi al la lingvaj karakterizoj

ŝanĝiĝintaj en la tempo kaj en la spaco. Etnalingvaj vortaristoj estas priskribantoj de tiu tutaĵo de influoj. Eventuale ili bezonas analizi, sed malofte bezonas preskribi. Esperanto naskiĝis kiel arta lingvo, kaj fariĝis vivanta. Sed ĝia vivo en sia diaspora komunumo estas tre malsama al tiu de etnaj lingvoj. Tial la rolo de vortaristoj ankaŭ devas esti tre malsama. Kaj multe pli grava.

La Esperanta diaspora komunumo havas tre malmulte da denaskuloj, sed eĉ tiuj ne estas filoj de denaskuloj. Eĉ ili ricevas fortan influon de la lingvoj de sia loĝloko kaj de siaj gepatroj. Por preskaŭ ĉiuj Esperanto-parolantoj nia internacia lingvo estas dua aŭ tria. Nia komunumo konsistas ĉefe el ĵusaj komencantoj kaj eternaj komencantoj. Kontraste al etnaj lingvoj, Esperanto havas relative malmulte da spertuloj. Kaj ili havas grandegan respondecon: ĉefe instruistoj, verkistoj, prelegantoj kaj – pli ol ĉiuj – vortaristoj. Same kiel gepatroj bezonas flegi la lingvon uzatan de siaj gefiloj, kaj geinstruistoj tiun de siaj gelernantoj, E-vortaristoj ankaŭ plenumas gravan flegistan rolon.

**Brazilei:** Pro sia fleksebleco kaj preskaŭ senlima ebleco de vortelemen-taj kombinoj, Esperanto eble estas la sola lingvo, kies uzantoj ĉiutage povas diri kun fiero: hodiaŭ mi kreis novan vorton! Ĉu normigado de esperantaj vortaroj per registro de foje nenecesaj importitaj vortoj ne igos la lingvon pli kaj pli rigide parenca al etnolingvoj?

**Sylla Chaves:** Nepras precizigi pri kies vortokreo oni parolas. Novuloj ŝatas inventi, pro ne trovo de ĝusta vorto aŭ por sin montri, tiel kontribuante por la dispeciĝo de Esperanto. Infanoj lernas respekti sian gepatran lingvon, sed multaj esperantistoj konsideras nian proponatan mondlingvon simpla ludilo. Tamen respondecaj aŭtoroj (verkistoj, tradukistoj, artikolistoj kaj similaj) rajtas kaj devas krei vortojn por precizigi sian penson kaj antaŭenpuŝi la lingvon. Vortaristoj devas helpi ilin, ne per pliaj inventoj, sed per registrado. Ĉefe de jam uzataj taŭgaj kunmetaĵoj, kiuj igas plian importadon nenecesa. Kiel vortaristo, mi malmulte inventis. Kaj ĉiam sekvis normojn establitajn de klasikuloj. Se mi inventis “muzikarko” (berimbao) estas pro ĝia analogio kun “pafarko”, “balancarko”, “ĉielarko”, “triumfarko” kaj aliaj vortoj tre uzataj en nia lingvo.

**Brazilei:** En unu el viaj prelegoj prezentitaj la pasintan julion, en Rio, vi diris, ke “Etnolingvaj vortaristoj preskaŭ nur priskribas, dum E-vortaristoj ofte bezonas preskribi.” Tion aŭdante, unuamomente, oni emas supozi, ke vortaristo estas pli influa ol la Akademio de Esperanto. Kia estas la rilato de vortarista laboro kun tiu de la Akademio?

**Sylla Chaves:** Kiel implicite en miaj ĉi supraj diroj, vortaristoj kaj la Akademio estas kaj devas resti influaj. La Akademio meritas pli da respekto ol ĝi kutime ricevas de la esperantistaro. Sed ĝia konsisto kaj labormaniero igas ĝin marŝi iom testude. Same kiel la aŭtoroj de PIV (kiujn mi multe respektas), ankaŭ mi konsideras la dokumentojn de la Akademio gravegaj, sed ne sufiĉaj por la bezonoj de la uzantoj de la lingvo. Same kiel PIV, ankaŭ PRAV indikas la oficialecon de la registritaj vortoj. Mi ankaŭ respektas PIV (precipe PIV2, por kiu mi iom kontribuis). Tial mi substrekas, klarigas kaj pravigas la punktojn, pri kiuj PRAV ne akordiĝas kun PIV, kiel ekzemple la grava artikolo “Amazonio”.

**Brazilei:** Malkiel ĉe etnolingvoj, nuntempaj esperantaj instruistoj bezonas distingi interalie Zamenhofajn, Fundamentajn, Oficialajn kaj Neoficialajn vortojn. Tia distingo, en la praktika uzado de la lingvo, tamen havas malmultan utilon... Ĉu vi opinias, ke tia distingo iam malaperos?

**Sylla Chaves:** Mi bedaŭras, ke kelkaj instruistoj, verkistoj kaj eĉ vortaristoj ofte neglektas tiun distingon. Mi konsideras ĝin ne nur utila, sed gravega en la momento, kiam oni decidas pri uzindeco de vorto. Tamen tiu hierarkio ne estas rigida. Kiel verkisto kaj vortaristo, mi sentas min libera por elekti, kiel en iu ajn etna lingvo. Kaj preferas malpezajn neoficialajn vortojn ol siajn oficialajn sinonimojn. Kelkaj estis poste oficialigitaj, aliaj ankoraŭ ne. Ekzemple: foti kaj foto, anstataŭ fotografi kaj fotografajo; komenti anstataŭ komentarii; diskrimini anstataŭ diskriminacii; aŭto, anstataŭ aŭtomobilo; buso, anstataŭ aŭtobuso; kaj (lastatempe) eĉ avio anstataŭ aviadilo. Tiu malgrandigo de vortoj okazas en ĉiuj lingvoj, kaj igas Esperanton pli fleksebla kaj belsona.

**Brazilei:** Ĉiu instruisto jam spertis tian situacion: post du-tri monatoj da lernado, lernantoj kutime volas akiri la plej bonan vortaron, malgraŭ tio ke ili apenaŭ sukcesas parkerigi plej elementajn vortojn de la lernata lingvo, ekzemple pronomojn kaj prepoziciojn. El tio oni emas konkludi, ke uzado de vortaro en elementaj kursoj pli damaĝas ol helpas. Kiel vortaristo, kion vi opinias pri tio?

**Sylla Chaves:** Mi opinias, ke la plej granda vortaro ne ĉiam estas la plej bona. La boneco de vortaro dependas de ĝia adekvateco al la celoj kaj kapabloj de la uzanto. Mi konsideras taskon de instruistoj helpi lernanton elekti la vortaron plej bonan POR SI. Instruisto, kiu ne agas tiel, similas kuraciston, kiu lasas pacienton akiri medikamenton laŭ sia bontrovo. Kuracisto ankaŭ indikas, kiel uzi medikamenton. Simile, instruisto devas instrui, kiel uzi vortaron (eĉ en la gepatra lingvo de la lernanto). Por lerni diversajn lingvojn, mi multe uzis (kaj ankoraŭ uzas) vortarojn. Depende de mia evoluo en la lernado, mi iris de dulingvaj al unulingvaj vortaroj, kaj de malgrandaj al grandaj. Mi petis helpon de instruistoj, kiuj ne faris tion propravole. Mi neniam konsideris etan kaj bone ellaboritan vortaron damaĝa por komencanto. Laŭ mi, la problemo estas la neglekto de instruistoj kaj la netaŭga elekto kaj redakto de artikoloj fare de kelkaj vortaristoj.

**Brazilei:** En unu el viaj prelegoj, vi substrekis, ke “ne sufiĉas, ke oni lernu legi, nepras, ke oni akiru la kutimon al legado”. Ĉu tio validas ankaŭ por konsulto al vortaro?

**Sylla Chaves:** En mia opinio, vortaro estas grava lernilo, en iu ajn nivelo de lingva evoluo. Tial eklernantoj devas legi simplajn vortarojn de komenco ĝis fino. La unua E-vortaro, kiun mi legis tiel, nomiĝas “Fundamenta Radikaro kun Portugala Traduko”. Poste, mi legis aliajn vortarojn aŭ similaĵojn, kiel la “Baza Radikaro Oficiala”, la “Baza Esperanta Radikaro” de Wouter Pilger kaj la “Hejma Vortaro” de Jouko Lindstedt. Ĉiuj de mi faritaj vortaroj destiniĝas al legado kaj studado. Por ke mia PRAV estu ankaŭ tia, mi forigas el ĝi balastajn vortojn kaj klopodas redakti ĝin en ĵurnalisma stilo. Mi ne scias, ĉu mi plene sukcesos aŭ ĉu mi havos tempon por fini ĝin.

# La Sekcio

## Budo Alloga

Brazila Sekcio de ILEI ĉeestis en la 42-a Brazila Kongreso de Esperanto okazinta en Rio de la 8-a ĝis la 13-a de julio 2007. La malfermo de la evento okazis vespere en la teatro de la ŝtata Universitato de Rio (UERJ) kun la ĉeesto de ĉirkaŭ 700 homoj. Al la kongreso mem, kiu okazis en alia universitato (SUESC), aliĝis 553 homoj, inter kiuj 30 alilandanoj el 11 landoj, kiuj pruntis al la evento internaciecan etoson. La 5-taga evento konsistis interalie el ĉiutagaj jenaj aktivadoj:

Libroservo de Brazila Esperanto-Ligo (BEL), kunvenoj, prelegoj, diskutrondoj, ekzamensesioj, konversaciaj rondoj, fulmkursoj de Esperanto, fak-kunsidoj, filmo-spektado, urbocentra promenado, aŭkcio, raporto de BEJO-ataŝeo, BEL-sembleoj, elekto de nova BEL-estraro, artaj vesperoj, bankedo kaj balo. Paralele al la kongreso, okazis ankaŭ la junulara kaj porinfana kongresoj. Ĉio ĉi en ĉarma loko kaj agrabla etoso.

La budo de la Brazila Sekcio de ILEI instalĝis en la halo de la kongresejo kie ankaŭ eksponis siajn

# Interne



Foto: Eni Alves de Oliveira

erojn Societo Lorenz, Legio de Bona Volo, Cearaa Esperanto-Asocio, Imagu Filmo, Oomoto kaj la tradicia ĉemizo-budo de la samideano Amarílio de Carvalho. Dum la evento oni lanĉis interalie jenajn titolojn: *Dom Casmurro*, de Machado de Assis, kun traduko de Paulo Sergio Viana (Eldonejo Oportuno); *Breno kaj Bruno*, plenkolora porinfana libro, de Paulo Sergio Viana (Eldono de la aŭtoro); *La Alkemiisto*, de Paulo Coelho, kun traduko de Carlos Valle (Eldono de la tradukinto); *Brazila Esperanta Parnaso*, organizita de Sylla Chaves kaj Neide Barros Rêgo (Eldono de la organizintoj); *La Patro*, DVD-filmo produktita de Imagu kaj reĝisorita de Joe Bazilio; *Parolu Plu!*, revuo kaj KD kun la voĉlegitaj tekstoj, kompilitaj de Emilio Cid kaj Lucas Yassumura (eldono de la kompilintoj); *Verkaro de J.F. Fajron de Lagatierie* (Harada Tsukuru); *Supernova*, muziko-KD (Vinilkosmo); *Memmortigo kaj ĝiaj konsekvencoj*, de Gerson Simões Monteiro, kun traduko de Givanildo Ramos Costa (Eldonejo Lorenz).

En la budo de la Sekcio, krom tiuj ses unuaj eroj, la kongresanoj povis ankaŭ trovi kelkajn importitajn titolojn: *Vojaĝo en Esperantolando*, de Boris Kolker (UEA); *Cisko kaj Vinjo*, kolora bildrevuo (FEL); *Infanoj en la Mondo*, ilustrita porinfana legolibro (UEA); *Esperantaj Sinonimoj* (UEA), *Esperanto Elektronike*, bunta varbilo (Espero)... Bedaŭrinde, pro lastamomentaj neatenditaĵoj, ne eblis lanĉi en la okazo la plej atendatan verkon, nome *Manlibro pri Instruado de Esperanto*, kiel anoncote.

Joseo Tenorjo

# Artifikoj por EVITI KONSULTON AL VORTARO



Desegnita kaj donace regalita de: Ulysses Balde.

Vi, diligentaj legemuloj, kiuj konsultas vortaron ĉiutage kaj konscias pri ĝia valoro por ellernado de lingvo, certe volas vipbati min. Trankviliĝu kaj lasu min kompletigi la titolon de mia artikolo. "...dum legado". Ĝuste tio: dum legado oni evitu konsulton al vortaro. Komencantaj legantoj, en fremda lingvo, duoble suferas: se ili multe iras al vortaro, rapide perdas la intereson pri la legata teksto; male, se ili pro pigremo aŭ alia motivo ne iras al vortaro, la teksto restas parte nekomprenebla kaj ili same rezignas plu legi.

Oftaj konsultoj al vortaro dum legado, krom devojigi la atenton de la leganto, estigas en li damaĝan kutimon, nome legi laŭvorte anstataŭ laŭ la kunteksto. Nepras memoriĝi, ke legado ne estas problemo nur por lernantoj de fremdaj lingvoj. Foje okazas, ke lernantoj ne havas kutimon konstante legi en sia propra gepatra lingvo. Espereble tiuj ĉi paŝoj por pli efika legado iel helpos al vi, estimataj komencantaj legantoj.



## ELEKTO DE TEKSTOJ



Laŭeble, elektu tekstojn, kies temo plaĉas al vi aŭ iel estas konata al vi. Uzu viajn antaŭajn konojn pri la legata temo por deĉifri tiujn partojn malpli klarajn en la teksto. Provu rekoni en la lernata lingvo la plej komunajn vortojn kaj esprimojn de via preferata temo. Ju pli ludece vi faras tion, despli malstreĉe fluas la legado. Se iu ŝatas abelbredadon, ekzemple, legante tekston pri tiu temo, multaj vortoj kaj esprimoj aspektas familiaraj en la nova lingvo, se ĝi parenças al la gepatra lingvo de la lernanto: *“Abeloj estas flugantaj insektoj parencaj al vespoj kaj formikoj. Ili estas adaptitaj por manĝi nektaron de floroj, kaj multe gravas en la polenigo de florantaj plantoj. Abeloj havas longan rostron por suĉi nektaron de floroj. La plej multaj specioj de abeloj loĝas en kolonioj, en kiuj nur unu ino - abelreĝino - produktas ovojn. Aparte interesaj por homoj estas la mielabeloj...”* <sup>(1)</sup>

## VORTO-ESPLORADO



Uzu viajn gramatikajn konojn por diveni al kio aludas la vortoj. La gramatika reguleco de Esperanto estas pova helpilo apenaŭ esplorata de komencantoj. Hazarde malferminte paĝon de libro aŭ revuo, vi povas diri, ke plej multaj vortoj estas nekonataj al vi, sed kompanse vi povas registri en via menso, ke vortoj finiĝantaj per “o” bildigas iun konkretan aŭ abstraktan nocion, ke vortoj finiĝantaj per “a” pruntas kvaliton al o-vortoj, ke vortoj finiĝantaj per “e” aludas al iu cirkonstanco (pri tempo, rimedo, kialo, loko, maniero k.m.a] kaj ke vortoj finiĝantaj per “as”, “is”, “os”, “us” kaj “u” indikas ke la ago de iu aŭ io, en la rakonto, okazas,

jam okazis, ankoraŭ okazos, eventuale okazus aŭ devas/estas dezirinde, ke ĝi okazu. Kompreneble tiu ĉi resuma klarigo ne sufiĉas por ke komencantoj tuj glate akompanu esperantan tekston, sed nediskuteble ĝi utilas kiel kompasoj por kuraĝaj aventuremaj legantoj. Legado estas ĝuste tia okupo en kiu lernantoj povas trovi tujan utilon por aplikado de tiuj bazaj informoj. Antaŭ nekonata o-vorto, grava por la kompreno de la rakontado, provu diveni kian nocion ĝi bildigas: ĉu konkretan, ĉu abstraktan? Per daŭrigo de la divenludo, deduktu ĉu temas pri homo, besto, manĝo, meblo, k.a.. Ni legu jenan pecon el rakonto de Machado de Assis<sup>(2)</sup>: *“Tuj poste li rifuzis la ideon, kun honto, kaj plu iradis per mallarĝaj paŝoj, al Placo Carioca, kie li luprenos **tilburon**. Li alvenis, envenis kaj ordonis rapidan trotadon.”* Se oni atentigas al la ĉirkaŭaj frazoj kaj al la ĝenerala kunteksto de la rakonto (la protagonisto estas en iu loko kaj bezonas iri al alia loko), oni povas facile dedukti, ke la nova vorto aludas al iu veturilo. Por la kompreno de la rakontado ne gravas, unuamomente, scii ĝuste pri kia veturilo temas. Poste oni povas kontroli ĝin en la vortaro. Ankaŭ ĉi-okaze ne valoras la penon haltigi la fluon de la legado kaj iri al vortaro serĉe de solvo por la mistera “lu” en “luprenos”. Sufiĉas kompreni, ke tie, en Placo Carioca, li prenos *tilburon*. Pri la vorto *trotado*, la aŭtoro mem klarigas, tri liniojn sekve, ke temas pri ĉevaltrotado, eltrovo kiu, siavice, helpas la leganton kompletigi la informojn pri la vorto *tilburo*: veturilo tirata de ĉevalo!

## KOMPARO DE VORTOJ



Faru komparon kun jam konataj vortoj en via gepatra lingvo, aŭ en aliaj de vi konataj, por diveni la signifon de novaj vortoj en la lernata lingvo. Multaj vortoj havas inter si komunan elementon, kiun en Esperanto oni nomas radikoj: *statu-o*, *epidemi-o*, *projekt-o*, *impost-o*, *arme-o*, *financ-o*, *kompani-o*, *reform-o*, *vizit-o* kaj miloj da aliaj. Oni restu atenta tamen pri danĝera lingva kaptilo: la tiel nomataj “falsaj amikoj” - vortoj similaj laŭ aspekto, sed prezentantaj malsaman signifon - “ANO” portugale signifas “JARO”, sed esperante ĝi signifas “MEMBRO”; “ADULTO” portugale signifas “plenkreskulo”, sed esperante “eksteredzecaj seksrilatoj”!



Se vi kapablas rekonu la tipon de teksto kiun vi legos, vi ne nur havos la okazon antaŭscii la tipon de informoj enhavataj en ĝi, sed ankaŭ mense prepariĝas por la batalo kontraŭ nekonataj vortoj. Nuntempe tekstoj pli kaj pli estas akompanataj de fotoj, ilustraĵoj, grafikaĵoj kaj tiaĵoj. Tiuj ĉi rimedoj multe helpas al la kompreno de teksto-enhavo. Donu iom pli da atento al ili! Antaŭ legado de artikolo, vidu la titolon, subtitolojn kaj ĉefe la nomon de la rubriko, se ekzistanta. Se vi rekonas, ke iu teksto temas pri recenzo de libro, ekzemple, vi jam povas antaŭvidi, ke la recenzisto prezentos resuman priskribon de la koncerna verko kun aldono de siaj favoraj kaj malfavoraj komentoj pri ĝi. Se, legonte tekston, kies rubriko temas pri turismo kaj kies titolo anoncas “Vojaĝo en Iberio”, vi povas supozi, ke la artikolisto prezentos raporton de sia veturado en tiu regiono kun priskribo de ties moroj, vidindaĵoj, kuirarto k.c.. Vortoj estas eroj de frazo, kiu estas parto de teksto, kiu estas ĉirkaŭata per kunteksto. Lerne vidi vortojn laŭ tiu amplekseco. La vorto “*trafikŝtopiĝo*”, aparte de iu kunteksto, eventuale malmulton signifas por vi. Se vi tamen trovas ĝin ene de teksto kiel “...en pluraj urbegoj de Ĉinio la rapideco de aŭtobusoj pli kaj pli malkontentigas la urbanojn. *Precipe matene, kiam la urbanoj devas veturi al siaj laborlokoj, preskaŭ ĉiam la rapideco falas sub 10 kilometrojn hore pro trafikŝtopiĝo.*”, estas plej probable ke vi komprenas ĝian signifon. Se eĉ tiel vi ankoraŭ ne bone elprenis la signifon, sufiĉos ĵeti rigardon al la foto kiu ilustras la koncernan artikolon<sup>(3)</sup> por forviŝi iun ajn dubon.



Lerne rekonu gramatikajn elementojn en la teksto: numerojn, prepoziciojn, korelativojn... Neniu povas regi lingvon sen almenaŭ parkerigi tiajn vortetojn. Mi konis lernanton kiu havis mirindan memorkapablon por gardi nomojn de futballudantoj, sed, kurioze, li pene parkerigis nur kelkajn tiajn esperantaĵojn. Min ĉiam mirigas, ke iu kapablas parkerigi longan nomo-liston de futballudantoj aŭ kinaktoroj, sed ne sukcesas enkapigi liston kun kelkdekoj da tiaj gramatikeroj!



## LUDADO PER PROBABLECOJ

Legado estas agrabla okupo per kiu oni akiras sciojn, kun aŭ sen amuzo, depende de la celo kaj animstato de la leganto. Ordinare legado de revuo, gazeto aŭ romano estas plezuriga afero, dum legado de matematika verko cele al ekzameniĝo povas esti iom teda. Por komencanto, legado en fremda lingvo ĉiam estas suferiga tasko. La vortoj ŝajne kaŝludas kun la nespertinta leganto... Ludu ankaŭ vi per probablecoj! Per iom da ekzercado oni lernas kompletigi mankantan spacon en propozicio, se oni konsideras iujn probablecojn por ke iu okazaĵo estiĝu. En la propozicio "Li vizitis siajn gepatrojn semajnfine kaj portis por ili ....." estas granda probableco ke la mankanta vorto estas "donacon".



## PACIENCO

Jen aperas nova vorto kaj vi senpacience rigardas al la vortaro apud vi... Enspiru profunde kaj legu plu. Foje daŭrigo de la legado portas la deziratan solvon. Legu la sekvan frazon: "*Arkeologoj en Bosnio malkovris lastatempe en la rivero Neretva restaĵojn de du **iliriaj** ŝipetoj pli ol 2200 jaroj aĝaj.*"<sup>(4)</sup> Scivolo bolas interne de vi kaj denove vi alrigardas la vortaron kiu eble ne povos helpi vin ĉi-okaze... Bonŝance, nia solvo aperas en la sekva paragrafo mem de la teksto: "...Danke al ili [la ŝipetoj]<sup>(5)</sup>, **ilirianoj** (praŭloj de hodiaŭaj albanoj) regis longatempe Adriatikon..." Bingo! Jen la klarigo: ŝipetoj apartenantaj al loĝantoj de antikva regiono, kie nuntempe situas Albanio.



## VORTO-ALUDO

Ordinare propozicioj enhavas vortojn kiuj aludas al iu jam menciita situacio. Plejofte tiuj aludiloj estas pronomoj/korelativoj. Kiam aperas tiaj vortoj, eble oni bezonas relegi la tekston por vidi al kio aŭ kiu(j) ili aludas. Konsideru jenan ekzemplon: *homoj timas sovaĝbestojn. Ili opinias, ke tiuj estaĵoj estas danĝeraj, eĉ kiam ili*

aspektas tute neatakemaj. Por kompreni la tekston, estas necese konsideri, ke la unua pronomo **ĜI** aludas al homoj, dum la dua **ĜI** aludas al sovaĝbestoj. Krome, necesas kompreni, ke la esprimo "tiuj estaĵoj" aludas al sovaĝbestoj kaj ne al homoj.

## SUBSTREKADO

Substreku la novajn vortojn kiujn vi trovas dum la legado por posta konsulto en vortaro. Ne forgesu substreki ankaŭ interesajn esprimojn kaj vortkunmetojn, per kiuj vi povos fari kompiladon de vortareto, laŭ temoj, por propra uzado. Antaŭ ol krei vian propran vortareton, tamen, vi bezonas lerni uzi aliulajn vortarojn. Sed tio estas temo por la sekva n-ro de Brazilei. Agrablan legadon!

- (1) <http://eo.wikipedia.org/wiki/Abelo>
- (2) La Divenistino kaj Aliaj Rakontoj - Machado de Assis, trad. Paulo Sergio Viana. Eldonejo Oportuno, San-Paŭlo, 2005, p. 17
- (3) revuo Monato, julio 2007/7, p. 20
- (4) revuo Monato, julio 2007/7, p. 18
- (5) grasigo de la artikolisto

Inspir- kaj konsultofonto por verkado de tiu ĉi artikolo: RUBON, Joan; THOMPSON, Irene. *Como ser um Ótimo Aluno de idiomas* [Kiel esti bonega lernanto de lingvoj]. 2.ed. São Paulo: Pioneira, 2003.

## Cecilia - Ulysses Baldez



# Elvira Fontes



*Omaĝo de la brazila instruistaro al nia  
elstara pedagogino*

Forpasis en urbo San-Paŭlo la 25-an de aŭgusto 2007 la elstara pedagogino Elvira Fontes. Ŝi naskiĝis en 1916 kaj eklernis Esperanton en 1960. Post sia emeritiĝo kiel profesia instruisto de la franca lingvo, ŝi plene sin dediĉis al instruado de Esperanto, ĉefe en Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP), kie ŝi agadis dum pli ol kvar jardekoj interalie kiel gvidanto de plurnivelaj kursoj, direktoro de la instrua departemento kaj kiel prezidanto mem de la Asocio (1974-1983). Dum multaj jaroj ŝi ankaŭ redaktis ties oficialan organon *La Lampiro*.

En la 70-aj jaroj ŝi gvidis, kune kun la karmemora Walter Francini, televidan Esperanto-kurson ĉe la publika TV Cultura (Fondaĵo Pastro Anchieta). De 1970 ĝis 1988 ŝi redaktis semajnan rubrikon pri Esperanto en la tiama fama taggazeto "Diário Popular". Krome oni ofte invitis ŝin paroli pri Esperanto ĉe gazetaro kaj televidstacioj.

En 1975 ŝi fariĝis sekciestro de ILEI en Brazilo. Dum sia plurjara laboro kiel gvidanto de la brazila sekcio de ILEI ŝi prizorgis la plurnivelajn ekzamensesiojn de Brazila Esperanto-Ligo kadre de ties enlandaj kongresoj. Krome sub ŝia redaktado dum kvar jaroj eldoniĝis la sekcia bulteno MILDE, kies unua numero aperis en 1998.

## Amikeco

de Dinah Mulock Craik  
tradukis: Elvira Fontes

*Ho, la konsolo - la neesprimebla konsolo  
senti sin sekura kun unu homo!*

*Ne bezoni mezuri la pensojn  
kaj la vortojn,  
sed elverŝi ilin senrezerve,  
ĝuste tiel, kiel ili venas:  
greno kaj ŝelo kune...*

*Kaj esti certa, ke fidela mano  
kaptos kaj kribros ilin,  
kaj tenos ĉio estas teninda,  
kaj per spiro de la amo  
forblovos la reston.*



Elvira Fontes

(1916 - 2007)

Ŝi aŭtoris du furorajn lernolibrojn, “Unuaj Paŝoj” (1989) kaj “Survoje al Esperantujo” (1991), ankoraŭ tre uzataj de multaj Esperanto-grupoj tra la tuta lando. Tria lernolibro ŝia, “Vivu la Suno”, restas en tirkesto atendanta publikigon. Temas pri 5-leciona lernolibro celanta rapidan enkondukan kurson de la lingvo. Ŝi ankaŭ multe tradukis kaj al tiu laboro ŝi sin dediĉis ĝis kelkaj monatoj antaŭ sia forpaso. Ŝia plej aŭdaca projekto, super kiu ŝi dum multaj jaroj laboris, tamen ne plenumiĝis, nome esperanta-portugala vortaro.

Elvira Fontes estis fakdelegito de UEA pri literaturo ekde 1973, komitatano A (1974-1980) kaj ekde 2000 Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio – UEA. Pro siaj laboroj favore al Esperanto, ŝi iĝis honora membro ankaŭ de Brazila Esperanto-Ligo (2003) kaj de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (2004).



# PRI LA VALORO RAKONTI KAJ AŬSKULTI RAKONTOJN

Paulo Sergio Viana

“Se oni rakonton rediras, ĝi novan detalon akiras.” (Proverbo)



Dekomence lingvo estis baze parola fenomeno; ĉiaj aliaj lingvaj rimedoj, ĉefe la skriba, aperis jarmilojn post tiu gravega paŝo en la evoluo. Baldaŭ la primitivulo malkovris, ke se unu individuo transdonas al la grupo siajn spertojn pri ĉasado, kaptado, kolektado, la tuta grupo gajnas. Oni povas imagi grupetojn ĉirkaŭ la fajro, post laciga tago plena de minacoj, kaj tiam ili provas rememori la okazaĵojn, ilin kompreni kaj eĉ sur ŝtonoj desegni travivitajn scenojn.

La sekva paŝo estis la akiro de simbolaj, reprezentaj signoj en ligo kun tiu transdono de spertoj. Emocioj ligiĝis al la vortoj: timo, kolero, (mal)ĝojo, perdoj, miro, k.s.. Tuj alvenis en la homan menson la baza angorsento: la simbola reprezento de morto. Modernaj homoj ĉiumomente uzas tiun riĉegan trezoron tute senkonscie pri la longa, miljara evolviĝo, kiu rezultigis la nunan staton.

## NI OBSERVU INFANOJN

Por konstati la gravecon de tiu socia-lingva-psika fenomeno – la rakontado – oni observu infanojn. Infanoj, al kiuj oni rakontas la tradiciajn historiojn, pli facile organizas en siaj mensoj bazajn emociojn pri morto, kolero, funebro, perdoj, danĝero, (mal)amo, kruelo, doloro, timo, respekto, sinofero, egoismo, k.s.. La psikanalizo Bruno Bettelheim verkis pri tio interesan libron, “Psikanalizo de ferakontoj”. Ne ĉiam temas pri moralinstruaj historioj; foje, ili estas kruelaj, krudsentaj, malmildaj, sed precize pro tio ili helpas infanojn sin prepari por la reala vivo, kaj ili tiel amegas tiajn rakontojn ke ili petadas, ke oni ripetu ilin sen eĉ minimumaj ŝanĝoj, multfoje.





La tradicia rakontado estas tiel grava, ke nuntempe oni trovas grupojn de homoj, kiuj amatore aŭ eĉ profesie sin prezentas en lernejoj, placoj kaj similaj lokoj kiel “rakontistoj”. Kvankam ili ne anstataŭas gepatrojn, geavojn kaj geonklojn, tamen ili plenumas utilan rolon.



## KIO PRI PLENKRESKAJ HOMOJ?

Ne nur ĉe infanoj rakontado kaj aŭskultado gravas, sed ankaŭ ĉe ĉiuaĝaj homoj. Kiu havas amikojn vivas psike kaj korpe pli sane. Kio estas amiko? Interalie, tiu estas homo, kiu aŭskultas vin kaj siavice raportas al vi siajn spertojn. Danĝere estas malaperigi tiun malnovan kutimon sidi kaj manĝi grupe. Tiu babilado ĉiutaga alportas tre valoran travivaĵon.

Ankaŭ plenkreskaj homoj, kiel infanoj, bezonas babiladon. Kompreneble, libroj rakontas, radio rakontas, kino kaj televido rakontas. Ili ja havas sian valoron. Sed granda diferenco montriĝas: spektanto nur aŭdas, sen la ebleco reagi, komenti, interŝanĝi vortojn kaj gestojn. Tia pasiveco faras la komunikadon unudirekta, kaj ĉi tio tute ŝanĝas la sperton.

Krome, kaj plej grave, amaskomunikiloj celas monon, kaj uzanto de ili tion konscias, pli aŭ malpli klare. Mongajno difinas la temon pri kiu oni rakontas ion per ili. Tio faras grandan diferencon.

## KIO OKAZAS DUM RAKONTADO?


Rakontado kaj aŭskultado implicas komplikajn, subtilajn elementojn klarigeblajn interalie per:

1. Flanke de la aŭskultanto:

a) kiam homo aŭskultas sperton raportatan de alia homo, li subjektive vivas mem tiun sperton;

b) la aŭtomata reago en la menso de aŭskultanto estas: kion mi farus en tia situacio? kion mi sentus?

c) per aŭskultado, oni atingas ian universalan dimension, ĉar la rakontojn la tuta homaro spertas.



## 2. Flanke de la rakontanto:

a) rakontanto sentas pli aŭ malpli grandan solecon post sia travivaĵo; rakonti mildigas tion – ĉar alia homo kunsentas;

b) rakontanto sentas plezuron emociigi alian homon, ĉar li spertas potencon super la aliula menso;

c) rakontanto akiras estimon de aŭskultanto pro la transdono; ni ĉiuj dumvive rememoras kun amo tiujn homojn, kiuj rakontis al ni ferakontojn.

## KIO PRI LA MODERNA VIVO?

Moderna vivstilo malfavoras rakontadon tiel al infanoj, kiel inter plenkreskuloj. Oni tro urĝas, ĉiumomente; la mondo ŝanĝiĝas vertiĝe; konkurado por socia "sukceso" ne lasas tempon por revado. Familioj jam ne sidas ĉe tablo por kune manĝi, aŭ antaŭ kameno por babilado. Oni ne "perdas tempon". Infanoj jam ne aŭskultas la tradiciajn rakontojn kaj plenkreskuloj malofte faras tion inter si. En la hejmoj ĉiu ĉambro havas sian televidaparaton, kiu akaparas la atenton, tiel ke familianoj apenaŭ rigardas unu la alian. Multaj homoj eĉ jam ne vespermanĝas normale, sed nur prenas rapidajn lunĉojn. Amikaj ligoj malfortiĝas; kreskas soleco, ĉefe en grandaj urboj; en landoj, kie perforto kaj krimado ofte okazas, hejmoj fariĝas prizonoj, el kie oni timas eliri. Soleco en grandaj urboj premas la spiritojn. Por mildigi tiun angoran senton, homoj alkroĉiĝas al efemeraj, iluziaj valoroj: mono, luksaj vestoj kaj aŭtomobiloj, senkultura turismo aŭ simpla sensenca vojaĝado. Mono, modo kaj maŝinoj estas la grandaj allogaĵoj. Mankas tempo kaj instigo al rigardo en la internon de onia animo.



## LITERATURO – REKTA HEREDANTO DE RAKONTARTO

Libroj iamaniere anstataŭis homajn rakontantojn, ne ekskludante ilin: gepatroj kaj instruistoj povas sidi kun infanoj kaj kun libro, kaj la rakontado fluas tre agrable, eĉ kun bildoj kaj en arte prezentita maniero. Kaj eblas konservi ĝin sur breto!

Libroj estas pli taŭgaj rakontantoj ol televido, ili ne pasivigas la legantojn – male: oni devas deĉifri la tekston, atribui al ĝi signifon, kiu eĉ povas varii laŭ la ellabora kapablo de la leganto. Bela sperto estas legi tekstojn en grupo kaj konstati la variadon de interpretoj.

La unua literaturaĵo en la okcidenta mondo estis la epopeo de Gilgameŝ, legenda reĝo en Mezopotamio, 18 jarcentojn antaŭ Kristo. Temas pri rakonto pri la akirado de saĝeco. Homoj amas romanojn. La inaŭgurinto de la moderna okcidenta romano estis sendube “Donkiĥoto de la Mancha”, kiun en Eŭropo oni elektis per popola voĉdonado kiel la plej bonan libron de la dua jarmilo.



## PRI ESPERANTO-LITERATURO

La genieco de Zamenhof inkluzivis psikologion – li ŝajne bone perceptis precize por kio taŭgas lingvo kaj kiel funkcias homa menso. Li klare komprenis, ke lingvo taŭgas unuavice por... rakontado. Kiam li volis pruvi, ke Esperanto estas vera, vivanta lingvo, tiam li komencis traduki la Bibliion, Fabelojn de Andersen, “Martan” de E. Orzesko, “Hamleton” de Ŝekspiro, “La Revizoron” de Gogol, “La Batalon de l’ Vivo” de Dickens – nome sukajn, riĉenhavajn historiojn kun universala valoro. Neniu konscienca uzanto de Esperanto rajtus neglekti relegadon de tiuj tekstoj kaj se eble rerakontadon de tiuj historioj al siaj infanoj kaj amikoj. Ĉar oni povas aserti, ke oni posedas lingvon nur tiam, kiam oni povas vivece, emocie rakonti en tiu lingvo.

Rilate la instruadon de iu ajn lingvo – inkluzive de Esperanto – oni devas ne nur lernigi demandojn kaj respondojn, sed ankaŭ praktikigi rakontadon. Tian fundamentan principon de instruado de Esperanto la brazila aŭtoro de instrumentadoj, Jair Salles, prave emfazas.

## KONKLUDE

Rakontado estas varmsenta, homama, riĉsperta, mense grava, homa bezono. Malgraŭ ĉiaj modernaj teknologiaĵoj, oni neniam flanken lasu ĝin. Male, oni rafinu ĝin kiel arton je la dispono de ĉiu homo. De ĉiu homo eblas aŭskulti ion interesan, se oni nur disponigas por tio sentemajn orelojn.

## Diskonigu vian gazeton

*Gazetejo.org* estas nova servo por kolektado de informoj pri esperanta gazetaro. Nuntempe krom disponigi informojn pri 38 gazetoj – aranĝitaj laŭ temo, loko, lingvo, ofteco kaj haveblo – la gazetejo ankaŭ gastigas 351 gazetajn numerojn senpage elŝuteblajn. Se via grupo aŭ asocio eldonas aŭ iam eldonis ajnan gazeton, PDF-igu la materialon kaj mem gastigu ĝin en la gazetejo aŭ, se vi preferos, rekte kontaktu la iniciatinton de la projekto ĉe <boris.legault@esperanto.qc.ca>.



Eventoj - bildkarto n-ro: bk0462



el la kolekto de Rudolf Burmeister

## Bildkarto-kolektoj

Virtualaj ekspozicioj pri Esperantaj bildkarto – kolekto kun pli ol 1400 esperantaj poŝtkartoj – atestas pri la historia fono de la esperanta movado en diversaj partoj de la mondo. La virtualan ekspozicion gastigas la budapeŝta Esperanto-Centro “Eventoj” en sia retejo ĉe <<http://www.eventoj.hu/bildkarto>>. Alia vizitinda kolekto pri bildkarto estas tiu de Esperanto-Ligo Filatelista ĉe <<http://www.geocities.com/bildkarto>> sub la organizado de James Piton el urbo Campinas/SP - Brazilo. La periodo kovrita en tiu ĉi montro estas ĝis 1939.

### ESPERANTO CELE AL KLERIĜADO

La nova estraro de Brazila Esperanto-Ligo (BEL), pere de ties vicprezidanto Paulo Sergio Viana el Lorena/SP, lanĉas la projekton BEL-Konferencoj, kies celo estas stimuli la brazilan esperantistaron al kleriĝado kaj plibonigo de siaj scioj pri la lingvo. Laŭplanite la unua BEL-Konferenco okazos en la urbo Lorena de la 3-a ĝis la 4-a de februaro 2008 kun minimuma partopreno de 20 aliĝintoj. Kiel parto de la projekto, broŝureto enhavanta ĉiujn tekstojn de la prelegoj estos eldonita kaj dissendata al la membroj de BEL. Aliĝo-peton oni jam povas direkti al la retadreso <psviana@terra.com.br>.

### KAMPANJO “ESPERANTO EN LA BIBLIOTEKOJN” PLUAS

Kadre de la kampanjo “Esperanto en la bibliotekojn”, aŭspiciita de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, estas ekspedita plia libro-pakaĵo, ĉifojde al la “Biblioteca Pública Municipal Clodomir Silva”, en la urbo Aracaju, ŝtato Sergipe. Ekde la komenco de la kampanjo, en julio 2001, estis senditaj pli ol 600 libroj en aŭ pri Esperanto al 50 brazilaj kaj 10 alilandaj bibliotekoj. La kampanjo estas subtenata de deko da brazilaj esperantistoj, kiuj libervole mondonacas al speciala fonduso tiucele kreita. (Informis Aloisio Sartorato per interreto)

### JUBILEA SIMBOLO DE UEA

La barcelona 24-jara dezajnisto Guillem Sevilla estas la laŭreato de la konkurso pri simbolo por la 100-jariĝo de UEA celebrata en 2008. Lia verko prezentas grafikaĵon laŭ formo de kvin parolvezikoj subtile aludantaj al la plej tradicia simbolo de Esperanto, nome ties 5-pinta stelo. La celebra emblemo ne havas fiksan formon kaj, laŭ klarigo de la aŭtoro mem, ĝi prezentas flekseblan identigan sistemon kun senfinaj potencialaj variantoj depende de la bezonoj kaj rimedoj. Variantoj de la nova simbolo estas elsuteblaj ĉe <http://www.uea.org/dokumentoj/simbolo/>.




### ENKONDUKA KURSO ELSENDIĜAS PER RADIO



Ekde la pasinta aŭgusto 2007 Radiostacio Rio de Janeiro (AM 1400 kHz) elsendas, ĉiudimanĉe je 6h45min, enkondukan kurson de Esperanto organizitan de Jair Salles kaj gvidatan de la radioparolisto Luiz Nascimento. La skriban materialon de la kurso oni povas elŝuti ĉe <[www.kke.org.br](http://www.kke.org.br)>. Pliaj informoj per la telefono (21) 2220-7486. Elsendado de la kurso okazas ankaŭ rete ĉe <[www.radioriodejaneiro.am.br](http://www.radioriodejaneiro.am.br)>. Fonto: Esperanto Notícias

## Unua libro verkita en Esperanto en Brazilo 70-jariĝas

Fabiano Henrique



La unua libro originale verkita en Esperanto en Brazilo fariĝas 70-jara. Temas pri Veterano, kies aŭtoro estas Iŝmael Gomes Braga.

La libro pritraktas la esperantistan travivaĵon de unu el la plej elstaraj aktiviloj de la Esperanto-movado ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en la tuta mondo, dum la unua duono de la 20-a jarcento.

La motivo de tiu verko estis demando disdonita okaze de la Brazila Kongreso de Esperanto, en la jaro 1937. Ĝi temis pri la spertoj de kelkaj gravaj samideanoj tiam taksataj maturaĝaj.

Kvankam Iŝmael Gomes Braga ne ŝatis esti konsiderata maljunulo, li konsentis respondi la demandojn. En la antaŭparolo li eĉ diras: “Veterano mi?!... Eksigita soldato aŭ emerita oficiro?!... Sed mi estas juna kaj brava batalanto!” Lia nura postulo koncernis al tio, ke oni rigardu lin kiel “junulon de pli da tempo” ol la aliaj.

Poste, la plenigita demando ebligis la eldonon de verko, kiu ja estas tre valora historia dokumento, plena je gravaj faktoj kaj konsiloj por la venontaj generacioj. “Mi koleris,

sed ne povis diskuti, ĉar ni estis antaŭ mikrofono...” – konkludis Iŝmael G. Braga, sprite vidigante rezignacion.

La unua eldono, farita de Eldonejo Gazeto de Ameriko fine de 1937, rapide elĉerpiĝis. Kelke da favoraj recenzoj aperis en esperantistaj periodaĵoj. Tiu tute neantaŭvidita situacio mirigis la aŭtoron kaj atestis la sukceson de la libro.

La teksto estis skribita en stilo simpla, flua kaj speciale gajhumora. Plenigas la libron kolekto da artikoloj el pluraj epokoj, ĉiuj riĉaj je saĝeco kaj sobreco. Tiuj kvalitoj – kaj aliaj trovotaj de la legantoj – faras el Veterano verkon nepre legendan de ĉiu scivolema esperantisto.

Ankoraŭ ekzistas multaj ekzempleroj de la dua eldono, publikigita de Kultura Kooperativo de Esperantistoj en 1965.

Veterano estas mendebla per la hejmpaĝo <[www.kke.org.br](http://www.kke.org.br)>; per poŝto oni povas ĝin aĉeti skribante al la jena adreso:

Cooperativa Cultural dos Esperantistas  
Avenida Treze de Maio, 47 – sobreloja 208  
20031-921 Centro – Rio de Janeiro, RJ



Iŝmael Gomes Braga

## PRI LA UZADO DE VERBA ASPEKTO EN ESPERANTO: MALLONGA ARO DA LITERATURAJ EKZEMPLOJ

Maria Nazaré de Carvalho Laroca - Juiz de Fora, MG

“Aspekto” ne estas oficiale kodigita de Zamenhof, sed spite al tio mi montros, ke Esperanto sukcesas esprimi tiun kategorion.

La plej universala aspekto-kontrasto estas tiu inter perfektivo kaj imperfektivo. La baza signifo de imperfektivo estas “eksplicita indiko de la interna tempa strukturo de verba situacio”. (Comrie:1976, p.24)

Ekz.: Kiam Petro eniris la librovendejon, mi aĉetadis librojn. Aĉetadis:imperfektiva aspekto; ĝi prezentas la agon en ĝia malvolviĝo. La rimedo por esprimi tiun aspekton estas la sufikso **-ad**. Imperfektivaj **ad**-verboformoj prezentas la verban situacion vidatan el ĝia interno, tial ties uzado estas tipa je priskribaj tekstoj.

La baza signifo de perfektivo estas manko de tia indiko; ĝi vidas la eventon kiel tuton.

Ekz.: Petro eniris la librovendejon.

Mi montros, ke nuntempaj bonegaj verkistoj kaj tradukistoj ankoraŭ uzas la sufikson **-ad** ĉiam, kiam ĝi estas necesa por bone esprimi ian daŭran situacion laŭ ia komunika intenco kaj celante la tekstan tipon. Pro tio mi elektis kelke da ekzemploj el la rakonto Brakoj (*Uns braços* - Machado de Assis) - bele esperantigita de D-ro Paulo Sérgio Viana:

1. a) “Inácio malrapide manĝadis, sen kuraĝo levi la okulojn de sur la telero.” (p.42)



Bernad Comrie

60-jara brita lingvistikisto, Profeso kaj Direktoro de la Departamento pri Lingvistiko ĉe Instituto Max Planck por Evoluanta Antropologio, en la germana urbo Leipzig, kaj honora Profeso pri Lingvistiko ĉe Universitato de Kalifornio en Sankta Barbara. Aŭtoro de pluraj libroj inter kiuj “Aspekto: Enkonduko al la Studo de Verba Aspekto kaj Rilataj Problemoj” (1976).



La Divenistino kaj Aliaj Rakontoj



b) *"Inácio ia comendo devagarinho, não ousando levantar os olhos do prato."*

2. a) *"Tamen, kulpis S-ino Severina, kiu havadis ilin tiel nudaj, ĉiam. Ŝi portadis mallongajn manikojn ĉe ĉiuj hejmaj roboj ."* (p.42)

b) *"Também a culpa era antes de D. Severina em trazê-los assim nus constantemente. Usava mangas curtas em todos os vestidos de casa."*

3. a) *"De kvin semajnoj li tie loĝadis, kaj la vivo estis ĉiam la sama."* (p.44)

b) *"Havia cinco semanas que ali morava, e a vida era sempre a mesma."*

4. a) *" - Ŝajne ĉi-hejme ĉio dormadas!"* (p.46)

b) *"- Parece que cá em casa anda tudo dormindo!"*

5. a) *"Borges respondis, ke li estas laca, ke li laboradas kiel sklavo, ke li ne emas al vizitoj por babilado.* (p.46)

b) *"Borges redargüia que andava cansado, trabalhava como um negro, não estava para visitas de parola."*

6. a) *"Inácio komencis senti, ke ŝi deturnadas la okulojn."* (p.48)

b) *"Inácio começou a sentir que ela fugia com os olhos."*

7. a) *"La ekscitiĝo de Inácio kreskadis, kaj li ne povis kvietiĝi, nek kompreni."* (p.49)

b) *"A agitação de Inácio ia crescendo, sem que ele pudesse acalmar-se nem entender-se."*

8. a) *"Ŝi singarde revenis rigardi lin, kaj vidis, ke li profunde dormadas. Peze dormadis la infano!"* (p.52)

b) *"Voltando devagarinho a espíá-lo, viu que ele dormia profundamente. Tinha o sono duro a criança!"*

La ĉefa diskursa rolo de verba aspekto estas estigi du rakontajn planojn: figuron kaj fonon. En la pritraktata rakonto estas dudek unu imperfektivaj **ad**-verbformoj kies rolo estas fonopriskriba, t.e., karakterizi la personojn, aĵojn, mediojn aŭ pejzaĵojn.

## Lumlilio sur la monto

(Guanabara)

de Osvaldo Orico (PA)


tradukis Sylla Chaves

lun matenon belan, post esploro,  
²u al krea°o sia mankas io  
por majstra kompletigo de l' laboro,  
iĜis pentristo, krom kreinto, Dio.

Prenas paletron kun amanta koro.  
Zorgas kun lert', okul' kaj man' pri ²io:  
²ielo, montoj... strekoj kaj koloro...  
kaj en la bildo nun aperas Rio.

Kaj tial, majstroverko de l' kreado,  
kreinto kaj krea°r sur korkovado<sup>(1)</sup>  
vidiĜas e² el fora horizonto.

Krespuske, je l' roziĜo de l' lazuro,  
-ajnas, ke krist' ekfloras el Naturo,  
samkiel lumlilio<sup>(2)</sup> sur la monto.



Poemo 267 el *Brazila Esperanta Parnaso* organizita  
de Sylla Chaves kaj Neide Barros Rêgo

- (1) Korkovado: pli ol 700-metra monto ene de la urbo Rio. Ĝia portugallingva nomo signifas Ĝibulo. Ĝi fariĝis speciale fama post starigo tie de grandega statuo de Jesuo Kristo skulptita en Francio.
- (2) lumlilio sur la monto: aludo en poemo 267 al la prilumo de la statuo de Kristo sur Korkovado, ĉiuvespere, dum la tuta jaro.



# Neforgesebla skoldo!

Iam maljuna instruisto eniris lernoĉambron kaj tuj perceptis, ke li havos iom da laboro por kvietigi la klason. Tre pacience li provis komenci la lecionon, sed sen sukceso. Je la dua fojo li iom embarase petis, ke la klaso silentiĝu. Vana estis lia peto: la gelerantoj, senatentaj al liaj vortoj, laŭte plu babiladis.

Tiam la maljuna instruisto perdis la paciencon kaj regalas la klason per jena neforgesebla skoldo:

“Atentu, ĉar mi parolos tion nur unu fojon”, li diris per kreskanta voĉo, dum kulposilento ekregis tra la tuta ĉambro.

“Dum mia longjara servado kiel instruisto, mi malkovris, ke nia laboro efikas sur nur dudekonon el la tuta lernantaro, alivorte nur 5 lernantoj elstariĝos estontece, nur 5 iĝos brilaj profesiuloj kaj signife kontribuos al la plibonigo de vivkvalito de la homoj. La aliaj 95% utilas nur kiel ciferoj. Ili estas tiuj kiuj pasas tra la vivo sen lasi ion valoran.”

“Estas granda bedaŭro ke ne eblas al ni apartigi ĉi tiun dudekonon disde la ceteraj, ĉar, se tio eblus, mi restigus tie ĉi nur la specialajn lernantojn kaj elĉambrigus la ceterajn. Nur tiel ekestus la silento necesa por gvidi bonan lecionon, kaj mi trankvile dormus, sciante, ke mi investis en la plej bonajn.”

“Bedaŭrinde ne eblas scii kiuj el vi estas tiaj lernantoj, nur la tempo povos tion montri. Tial mi devos rezignacii kaj provos gvidi lecionon por la specialaj lernantoj, malgraŭ la tumulto farata de la ceteraj.”

“Nu, kompreneble ĉiu el vi ĉiam povas elekti al kiu grupo vi volas aparteni. Dankon pro via atento kaj ek al la leciono!”

(Resumo de anonima retmesaĝo)



## Krevmaizo\*

Neniu certas, sed ĉio indikas, ke maizo aperis en Ameriko ĉe la majaa popolo, antaŭ pli ol mil jaroj. Grajnoj de maizo, taŭgaj por krevado, estis trovitaj de arkeologoj ankaŭ ekster Peruo, kio indikas, ke tiu grajno estis parto de la nutrado de diversaj amerikaj popoloj. Komence la majaoj krevigis maizon uzante la tutan maizospikon sur lignofajro. Poste ili ekuzis la grajnojn rekte sur la barĝoj, ĝis ili inventis pli kreeman manieron kuiru la maizgrajnojn, nome ene de argilpoto enhavanta varman sablon. La celo estas ĉiam la sama: krevigi la maizograjnon. Sed kiel tio okazas? En la interno de maizograjno estas iom da akvo kiu, sub efiko de intensa varmigo, bolas kaj rompas la ŝelon de la grajno, lasante ke ties interna blanka mola tavolo aperu.



Tion faris majaoj kaj tion plu faras homoj ĉirkaŭ la mondo. Nun oni uzas oleon, anstataŭ sablo, sed pli kaj pli oni uzadas mikroondajn fornojn por prepari bongustan kaj bonodoran krevmaizon. Nuntempaj homoj, fieraj pri sia krevmaizo preparita en moderna aparato, apenaŭ suspektas, ke antaŭ pli ol mil jaroj majaaj indianoj jam uzadis la principojn de mikroonda forno por prepari sian kreivmaizon!

\* Omaĝe al Raimundo José Medrado kaj Josefa Pereira Medrado.

En kelkaj regionoj de Brazilo homoj ankoraŭ uzadas sablon por krevigi maizon. Antaŭ kelkaj monatoj amiko mia, kies gepatroj spertas pri tiu kuirmetodo, donis raporton pri tiu tekniko, kiun mi nun transdonas al vi.

Por prepari aŭtentikan krevmaizon bezonatas argilpoto, lignofajro, sablo, kribrilo kaj maizgrajnoj. Pri la sablo, taŭgas nur tiu postlasita de pluvo sur tervojo. Kiam vi sukcesos trovi ĉiujn bezonatajn erojn, iru al la sekva paŝo: verŝu iom da sablo en la argilpoton kaj sur la sablon ŝutu manplenon da maizgreno; poste kuŝigu la poton iom oblikve sur flamanta barĝofajro, kovru la aperturon de la poto kaj atendu. Kiam la maizgrajnoj ekkrevos, demetu la kovrilon, proksimigu la kribrilon al la aperturo de la poto kaj miru pri la flugantaj blankaj pufmaizoj saltantaj en la kribrilon! Spicu ilin per salo laŭguste kaj agrablan frandadon!

Pliaj konsultfontoj:

<http://www.pipocadovadir.com.br/curiosidades.php>

<http://mundoestranho.abril.com.br/curiosidades>




## Ludigu viajn infanojn per butonoj

Nian ĉinumeran sugeston por lude kaj lerne aktivigi viajn gelernantojn proponas Conceição Rodrigues el San-Paŭlo/SP.

Materialo bezonata: diversformaj butonoj, koloraj kartonpecoj, skribiloj, gluaĵo kaj kreemo...

Preparu kelkajn modelojn de butonbildoj por montri al la klasanoj kaj kontrolu mem la gradon de malfacileco laŭ ilia aĝo. Unue proponu, ke ili libere kreu hombildojn cele al ekzerciĝo. Pri la desegno, ju pli simpla kaj aluda ĝi estas, despli reliefe la butono aperas en la bildo.

Kiel duan paŝon, proponu aldonon de liberaj parolvezikoj. Plian sugeston: verku mem parolvezikojn por du-tri roluloj kaj proponu, ke la lernantoj ilustru ilin. Laste skanu kelkajn laborojn kaj sendu ilin por publikigo en nia retejo.



Traduku la ĉisuban pecon preniton el la verko de Guimarães Rosa, *Grande sertão: veredas*, p. 113, kaj sendu vian tekston rete al [revuo@ileibr.org](mailto:revuo@ileibr.org) aŭ poŝte al la adreso de la Sekcio (vidu en la kolofono). La plej bona solvo de traduko gajnos libro-premion kaj estos publikigita, kun komentoj, en la sekva n-ro de Brazilei.

— “Riobaldo, pois tem um particular que eu careço de contar a você, e que esconder mais não posso... Escuta: eu não me chamo *Reinaldo*, de verdade. Este é nome apelativo, inventado por necessidade minha, carece de você não me perguntar por quê. Tenho meus fados. A vida da gente faz sete voltas — se diz. A vida nem é da gente...”

Ele falava aquilo sem rompante e sem entonos, mais antes com pressa, quem sabe se com tico de pesar e vergonhosa suspensão.

— “Você era menino, eu era menino... Atravessamos o rio na canoa... Nos topamos naquele porto. Desde aquele dia é que somos amigos.”

Que era, eu confirmei. E ouvi:

— “Pois então: o meu nome, verdadeiro, é *Diadorim*... Guarda este meu segredo. Sempre, quando sozinhos a gente estiver, é de Diadorim que você deve de me chamar, digo e peço, Riobaldo...”

Libro-premion, pro sendo de korektaj respondoj de la antaŭa konkurso “Taksu viajn konojn”, gajnis Osmar da Silva Alves. Li estas membro de ILEI-br kaj kursgvidanto ĉe Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP) kaj Esperanta Klubo Zamenhof (EKZ), ambaŭ en la urbo San-Paŭlo, kie li vivas kaj laboras. Cetere li estas la elpensinto kaj desegnisto de la komiksulo Zaĉjo aperanta diverspaĝe en tiu ĉi numero de Brazilei.



Baza kurso de Esperanto komenciĝis en la urbo Guarulhos/SP post publika parolado prezentita de Arnaldo Alves de Oliveira en la Spiritisma Societo Joanna de Ângelis komence de februaro 2007. Al la kurso, gvidata de Arnaldo de Oliveira mem, aliĝis 40 homoj, el kiuj 16 daŭre ĉeestas ĝin ĉiuvendrede de la 8-a ĝis la 9-a vespere.

Adreso de la kursejo: Rua São Manoel, 567 - Vila Galvão, 07073-010 Guarulhos, SP - tel. (11) 6451-3208

Komence de septembro 2007 "Instituto Ser Pleno", en la urbo São José dos Campos, malfermis bazan kurson de Esperanto sub la gvido de Eni Alvim de Oliveira. Al la kurso aliĝis 8 homoj kaj pliaj 5 kuniĝos sekvalacione, laŭ informo de la kursgvidantino. Materialo uzata estas la lernolibro "Esperanto Conversacional", de Jair Salles. La kursejo situas ĉe strato República do Líbano, 385 - Jd. Osvaldo Cruz (apud la aĉetcentro Centervale). Telefono por kontakto: (11) 3941-1205 / 9743. Eni Alvim de Oliveira estas membro de la Brazila Sekcio de ILEI kaj instruistino de la eksa projekto Nesto, per kiu ŝi prizorgis ĉ. 20 gelernantojn, kaj de la perreta kurso de Kultura Centro de Esperanto (KCE) el Campinas/SP, per kiu ŝi nun zorgas pri du lernantoj.



## Salutoj de Pollando!

Mezaĝaj polaj esperantistoj, eklernintaj la lingvon en 2005, deziras korespondadi per interreto kun gebrazilanoj. Mesaĝon sendu al s-ro Marko Pierkiel <esoerantus@wp.pl> el urbo Kety <www.kety.pl>, kiu ĉeestas Esperanto-klubon en urbo Andrychow <www.amikeco.andrychow.pl> kaj en urbo Bielsko-Biala <www.esperanto\_bilesko.republika.pl>.







Publika lernejo en la urbo Três Rios (Tri Riveroj), en Rio, proponis bazan kurson de Esperanto sub la gvido de Jorge Linck. La trimonata kurso komenĉiĝis en junio 2007 kaj plia klaso ĉeestos la kurson, kiu daŭros ĝis decembro. Salutvortoj al la finkursintoj estos bonvenaj: <diego\_bnh11@hotmail.com>, <lmaia-ada@yahoo.com.br>, <vanydiana@hotmail.com>, <aleixotresrios@hotmail.com>, <ruanita\_help@hotmail.com>.

Plej freŝa numero de Interlingvistika Revuo (Julio/2007) estas rete legebla ĉe <<http://leitejr.sites.uol.com.br/esperanto/ilr200707.htm>>. ILR estas redaktata de la brazilanoj José Leite de Oliveira Junior, Federacia Universitato de Cearao; Paulo Nascentes, Universitato de Braziljo kaj Emerson Wernek, Universitato de Braziljo.

“La kongreso sukcese finiĝis kun 1901 partoprenantoj el 57 landoj” – anoncas la organizantoj de la ĉijara Universala Kongreso de Esperanto, okazinta aŭguste en la japana urbo Jokohamo. La oficiala retejo de la kongreso disponebligas buntan kaj riĉan materialon pri la evento: pdf-versiojn de la kongresa kuriero “Ondas Jokohamo”, videojn kaj fotojn. Vizitu ĝin ĉe <http://www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/espe/gheneralo.htm>>. Por vidi aliajn fotojn pri la kongreso vizitu ankaŭ la adreson: <<http://picasaweb.google.com/irea.oficejo/UK2007FotojDeReTo>>.



## Zaĉjo - Osmar da Silva Alves



Lernanto levas la brakon dum vi provas kiel eble plej glate gvidi la lecionon. Vi konas tiun brako-leviĝon. Unue vi provas ŝajnigi, ke vi ne vidas la geston. Sed la brako daŭre tenas sin super la kapoj kiel anteno vokanta ĉies atenton, kaj vi ne havas alian elekton ol haltigi vian legadon kaj aŭskulti la fulmefikan demandon: "Instruisto, kiel oni diras...?" La ceteraj gelernantoj, kiuj ĝis nun malatentis al la leciono, scivolemaj, ĵetas sur vin tre atentajn rigardojn. Kion vi faras: a) konfesas, ke via poŝvortaro estas tre limigita ; b) promesas trovi iun amikon kiu havas aliron al interreto por ke li konsultu la vorton; c) trankviligas la demandinton, ke vi skribos al Brazilo kaj portos la respondon en la sekva leciono?

Guarda-costas = korpogardisto

Informatização = enkomputiligo > *Enkomputiligo de la biblioteka libro-katalogo.*

Saída de emergência = savelirejo [sav-el'ir'ej-o]

Fanático = ĝisosta > *Li estas ĝisosta sportemulo.*

Recheio = farĉo > *Kuko farĉita per fragokremo.*

Escala de plantão = deĵorvicigo > *Oni deĵorvicigis lin por labori dum la feriotago.*

Agência de casamento = svatagentejo

Reunião de Cúpula = Pintkunsido > *Pintkunsido de Tutamerikaj Ŝtatestroj.*

Conta poupança = ŝparkonto

Fã clube do livro = Asocio de libro-ŝatantoj > *Asocio de Lorenz-ŝatantoj.*

Obra pública = Vorko > *Ministro pri Publikaj Vorkoj.*

Embalagem descartável = unu-uza ujo > *unu-uza lakto-botelo.*

Legu en la sekva numero de Brazilei  
specialan artikolon pri la valoro de  
bildliteraturo en lernoĉambro.  
Ni renkontiĝos tie.

Ĝis revido!



**Portu iom pli da  
enhavo en vian  
lernoĉambbron!**

